Gerda Illerhues,

Vespera krepusko

tradukita de Manfred Retzlaff

Vespera krepusko –
Sinkas la sun'.
Ombrojn ludantajn
vidas mi nun.

Vespera krepusko –
Susuras la vent',
fora ekrido
en la silent'.

Vespera krepusko –
Aŭdiĝis jen kri',
turmenta hastado,
jam pasis nun ĝi.

Vespera krepusko –
Eklumas la klar',[3]
dum noktoproksimo,
de la stelar'.

Vespera krepusko –
Tempo de l' ben',
estonto tre foras
kaj la maten'.

Vespera krepusko –
ripoz' ĉie ĉi,[4]
paca trankvilo
elmane de Di'.

Traduko de la Germana poemo "Abenddämmern" de Gerda Illerhues *(∗1930) en Esperanton de* Manfred Retzlaff *(∗1938-11-04) en 2001-05-29.*

MR-351-1b / Arg-771-1548 (2013-01-16 18:18:18)

[3] aŭ:
Eklumas en klar',
dum nokt' proksimiĝas,
jen la stelar'.

[4] aŭ senrime:
ripozas la land',
paca trankvilo
el Dia man'.